MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 7-8

JULIO - AŬGUSTO 2017 Kol.387-8/33

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: La feliĉo, Metodo diagnozi skizofrenion, Bona humoro, Bahá´i, Andrea Bocelli, Kanadanino, La unua roboto, E-renkonto Šumperk, Drabaj ĉambretoj, El la redakcio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La feliĉo

Romana van Dalsen NL

La feliĉo ne troviĝas en la mono,
en juvelaro aŭ eĉ en ora krono.
La feliĉo ne estas aĉetaĵo,
ĝi ne aperas per iu posedaĵo.
Ĝi veturas ne en luks-aŭtomobilo,
kaj ne flugas en privat-aviadilo.
Ĝi ne vivas en grandegaj, riĉaj domoj,
aŭ en la agoj de fest-amantaj homoj.
Sed la feliĉo, kiel simpla bela flor´,
unue kresku en nia propra kor´.
La feliĉo povas kuŝi en rideto,
aŭ en ĝojkrio de gaja infaneto.
La feliĉo povas kuŝi en fideleco,
aŭ en kompreno de sincera amikeco.
Sed la feliĉo, kiel simpla bela flor´,
unue kresku en nia propra kor´.

La metodo aperis por fari fruan diagnozon pri skizofrenio, jam ĉe la unua vizito al psikiatro

Brazilaj sciencistoj disvolvis metodon, kiu helpos psikiatrojn frue diagnozi skizofrenion. Per algoritmoj, la tekniko analizas la parolan strukturon de junaj pacientoj, kiu povas anticipi la diagnozon per almenaŭ ses monatoj, kaj tio evitas la riskon – tre oftan – submeti la malsanulojn al malĝusta medikament-kuracado. La studo, kiu priskribas tiun novan metodon, estis publikigita en la revuo Schizophrenia, el la grupo de la scienca gazeto Nature, fare de skipo gvidata de la neŭrosciencisto Sidarta Ribeiro el "Instituto de la Cerbo", lige al Universitato Federacia de Norda Rio-Grando (Natalo – Brazilo).

"Tiaj malsanoj ne havas biologiajn fundamentojn precizajn, tial mankas taŭgaj provoj por ilin diagnozi". Tion asertis Ribeiro. Ĝis nun, ses monatojn da observado oni bezonas por trafi ĝustan diagnozon kaj eviti eraron pri medikamentoj kaj katastrofo.
"Ni pruvis, ke eblas kalkuli unununuran numeron – kiun ni nomas 'fragmentiĝa indico' – kiu kapablas antaŭvidi per alta certeco la diagnozon pri skizofrenio ĉe la unua psikiatria intervjuo kun la paciento", diris Ribeiro.

Dum la esplorado, tiu tekniko antaŭvidis la diagnozojn kun pli ol 80% da precizeco.

el portugallingva artikolo

Bona humoro subtenas la memoron

Ĉu la memoro bone funkcias, tio estas ankaŭ demando de sinteno. Kiu senstreĉe rilatas al la maljuniĝo, tiu forgesas malpli. Jen ekzercoj por la memoro.

Eĉ se tio sonas iom neverŝajne: Nia propra sinteno al nia memoro influas tiome, kiel bone ni povas memorteni aferojn kaj kiel ni pritaksas nian mensan freŝecon. Tio rilatas ankaŭ al nia sinteno koncerne al la temo de "maljuniĝo". Al tridekjarulo tio ankoraŭ ne estas signifa, se li kredas pri si mem ke li en la maljunaĝo perdos mensan freŝecon, sed ju pli multaj homoj pliaĝas, des pli ŝajnas, ke ilia memorkapablo kaj eĉ ilia korpa bonfarto dependos de tio, ĉu ili havas pozitivajn aŭ negativajn imagojn pri la maljuneco.

Kiel tiuj kuntekstoj precize aspektas, tio estas ankoraŭ science neklarigita. Diversaj faktoroj ludas perantan rolon: Kiu ekzemple kredas pri si, ke li kapablas bone memorteni aferojn - sendepende de la aĝo - tiu kuraĝos fari pli kaj entreprenos pli. Kaj kiu akceptas la pliaĝiĝon kun anima trankvileco, tiu estas pli bonhumora - kaj ankaŭ pozitiva; emocia sinteno plibonigas la memorkapablon. Ne estas hazardo, ke homoj kun gravaj depresioj ofte suferas pri perturbo de la memorkapablo. Nun do temas pri tio ŝanĝi iomete la sintenon pri la propra memorkapablo kaj pri la aĝiĝo. Jen du alternativoj por ekzercoj - por ankoraŭ junaj homoj kaj por ne plu junaj homoj.

Por junaj homoj

Verŝajne vi ankoraŭ ne multe cerbumas pri tio, kiel aspektos via vivo, kiam vi estos rimarkeble pli aĝa. Faru nun foje salton en via imago kaj pripensu: Kiel vi fartos se vi estos 60- jara aŭ pli aĝa? Ĉu tio estas bona sento? Aŭ ĉu negativaj pensoj kunsonas? Pripensu nun, ĉu vi povas projekcii pozitivan vizion en via vivo 60-a jaraĝo. Kion vi faros? Ĉu vi estos saĝa? Kiu pli aĝa aktoro aŭ kiu pli aĝa politikulo povus servi kiel modelo por vi? Aŭ ĉu eble en via socia medio troviĝas homoj kiuj "bone" maljuniĝas? Desegnu laŭeble precizan bildon. Kaj nun venas la propra tasko: Ĉiam kiam vi konfrontiĝas kun la temo de memorkapablo ("Kie estas la ŝlosilo por mia aŭto?") aŭ kun la temo maljuneco ("La kanzonisto Ikso mortis?"), tiam pensu pri tiu pozitiva, mense kapabla bildo pri via propra maljuneco: Ĝuu tion!

Por nejunaj homoj

Tute klare, ĉi tie ne temas pri "cerbolavado". Ĉiu scias, ke la memorkapablo dum maljuniĝo vere malkreskas. Tio estas normala. Observu tamen dum via ekzercado precize, kiel aspektas viaj akompanaj pensoj kaj emocioj, se vi dum la ĉiutago forgesas ion, konfuzas ion, misformetas ion. Atentu pri tio, ĉu vi reagas je tio pesimisme ("Tiel estas, se oni estas maljuna", "Tipe, mi ne plu kapablas fari tion tiel") kaj ĉu vi havas malagrablajn sentojn ("Domaĝe ke ne plu fariĝos kiel dum antaŭaj epokoj", "Mi estas malkapabla"). Provu dum la ekzercado ne plu sekvi tiujn pensojn kaj sentojn kaj provu eĉ moki ilin. Parolu al vi mem la negativan penson aŭ komenton ekzemple per alta voĉo aŭ kantu ĝin kvazaŭ furorkanton. Tiel ĝi perdos sian negativan

efikon. Provu la rimedojn por malvenki la pensojn pri la temo "Mi estas maljuna, tion ĉion mi ne plu kapablas".

La ekzercoj dum tiu tempo kaptas pli la psikon ol la menson. La trejnadaj unuoj tial ne havos tujajn rektajn efikojn sur la memorkapablo. Sed se vi havos la senton, ke tiuj ekzercoj precize trafos "vian temon", tiam la prilaboro de via sinteno ja tre bone daŭre povos helpi al vi - ĝi plibonigos vian bonhumoron kaj vian memorkapablon. El la retradio

Amikaj rilatoj inter Bahá'i kaj la Esperanto movado

La movado Bahá'i ekestis en medio de absolutisma persa monarĥio en la 19-a jarcento. Per iom post ioma evoluo ĝi el islamisma sekto fariĝis universala religio, kiu proksimiĝas al ideoj de eŭropaj humanismo kaj demokratio. Multaj esperantistoj konfesas tiun ĉi kredon aŭ almenaŭ havas simpation por ĝi.



En la jaro 1844 la juna komercisto Sajjid Alí Muhammad proklamis sin heroldo de la nova Dia sendito. Li alprenis la nomon Báb, laŭvorte tradukatan kiel "pordego". Sin mem li opiniis nur anoncisto de iu pli grava ol li mem estis, kiu aperos dum deknaŭ jaroj kaj komencos disvastigadi sian doktrinon. Tiu fondinto de la nova religio estis Bahá'u'lláh. La celo de Bahá'i estas konstrui novan civilizacion,

en kiu okazos unueco de la homaro sub la devizo: unu Dio, unu homaro, unu religio.

Li asertis, ke la historio de la religioj estas fakte la historio de unu kredo, kiu en diversaj tempoj plenumadis diversajn bezonojn. Abraham, Moseo, Budao, Kriŝno, Jesu-Kristo, Muhamedo, Báb kaj Bahá'u'lláh estas manifestuloj, per kiuj iom post iom Dio malkovras siajn intencojn kaj donas direktivojn por ĝusta vivo.

La unueca universala komunumo devas al ĉiuj ŝtatoj garantii aŭtonomion kaj respekti liberecon de ĉiu unuopulo. Ĝiaj leĝdonantoj devos favori nur tiajn leĝojn, kiuj kontentigos la bezonojn de ĉiuj loĝantoj, nacioj kaj rasoj. Multaj kompetentecoj tamen restos ĉe naciaj kaj lokaj organoj. La ĉefa devizo nome sonas: Unueco en diverseco.

La nova ekonomia sistemo certigu regulan distribuadon de ekonomiaj rimedoj. La barieroj malhelpantaj liberan komercon kaj movon de varoj estos falintaj. En la estonta superŝtato oni supozas zorgan kontrolon kaj reguladon de tutmonda monsistemo kun pli-malpli konstanta valoro. Neallasebla estas ekstremaj riĉeco kaj malriĉeco.

Al unuigo de la homaro laŭ Bahá'i helpos ankaŭ uzado de komuna lingvo, eksplicite Esperanto. Sur universala bazo funkciu ankaŭ la ceteraj rimedoj de komunikado, precipe tiuj faciligantaj rapidan konversacion kaj interligon de ĉiuj partoj de la mondo. Ĉu oni antaŭdiris la ekeston de interreto? Oni devas forigi ĉiujn antaŭjuĝojn pri diferencoj inter homoj. Precipe virinoj meritas samajn rajtojn kiel viroj. Bahá'i rifuzas antaŭedzecan kaj eksteredzecan sekson, rezistas al samsekseco, kiun ĝi opi-

nias kontraŭnatura kaj obscena. La homo ankaŭ ne uzu iujn substancojn koruptantajn la organismon. Tio koncernas precipe fumadon, trinkadon de alkoholaĵoj kaj uzadon de drogoj.

Ludoviko L. Zamenhof estis konvinkita, ke apud neŭtrala lingvo la homaro nepre bezonas ankaŭ komunan religion por firme establi intergentan kompreniĝon kaj pacon. Tial li konsideris la Esperanto-movadon ne kiel celon en si mem, sed kiel rimedon por eduki homojn pri unueco.

Sian homaranismon Zamenhof konceptis kiel neŭtrale homan ponton inter religioj. Li neniam pretendis fondi novan religion, sed opiniis, ke bahaaj instruoj tenas en si la potencon de dia inspiro. Bahaismo ne nur proklamas la samajn mond-unuigajn idealojn kiel la aŭtoro de Esperanto kaj eĉ plenkore pledas por la adopto de internacia helpa lingvo kaj komuna skribo, sed ĝi esence transiras la karakteron de boncela, idealisma movado. La bahaan kredon akceptis por si, krom aliaj 6 milionoj da homoj, ankaŭ Lidia Zamenhof, filino de Ludoviko Zamenhof.

Josef Hron

La mondfama tenorulo Andrea Bocelli

Kiam lia patrino gravediĝis, la kuracistoj rekomendis al ŝi aborton. La risko, ke la infano, kiun ŝi portis en sia sino (interno), estos handikapita, estis tro granda. Ne! respondis ŝi senhezite.

La 22.9.1958 naskiĝis al ŝi la eta Andrea, kiu fine, kvankam blinda, iĝis unu el la plej mondsignifaj tenoristoj. Andrea naskiĝis en la vilaĝo Lajatico en la regiono Toskano. Lia patro vendadis maŝinojn por agrokulturado kaj ne ŝatis operojn. „Por

li tio estis malnova afero“ – rememoras la itala kantisto, „sed poste li estis tre fiera pri mi“.

Andrea spite, ke li havis glaŭkomon, klopodis kreski kiel la ceteraj knaboj. Kiam en sia 12-a jaro li ricevis baton sur kapon de futbala pilko, li komencis sangi en sia cerbo kaj li tute blindiĝis.

Sed li kutimiĝis batali. Sukcese elstudis juron en la universitato de Pisa — en tiu tempo lia koro jam apartenis al la muziko - jam de sia naskiĝo. Kiam li ploris en la lulilo, la tonoj el magnetofono laŭdire tuj silentigis lin. Naŭjara li konis parkere multajn ariojn. La gepatroj ne tro komprenis lian pasion, sed li ne lasis sin persvadi. Por la studado de operoj li strebis akiri monon pere de kantado kaj pianludado, li ankaŭ provis verki muzikon.

Kun amo li rememoris siajn instruistojn, muzik-konceptojn de Luciano Bettarini kaj Frank Corelli – ili donis al li multe da muzikscioj. La publiko eksciis pri Bocelli en la unua duono en la 20-a jarcento. Sian unuan albumon „mare calmo della sera“ li eldonis en la jaro 1994, post pluaj tri jaroj li eldonis la albumon Romanza. La kantisto kaj komponisto Zucchero kantis kun li la dueton Miserere kaj la anglino Sarah Brighman la anglan version de la itala kanto Con Te Partiro.

Bocelli de tempo al tempo estas riproĉita pro tro la larĝa skalo – de opero ĝis popo. Sed Célinne Dion proklamis, ke se Dio havus

voĉon, ĝi estus ĝuste la voĉo de Andreo. La voĉo en si traplektas melankolion kaj klarajn kolorojn, en ĝia esprimo miksas sin tera sopiro kun dia amo. Li mem ne konsideras sin operkantisto, eĉ ne popa stelo kaj memoras, ke de opero kelkfoje ĉiuj plej grandaj tenoristoj en la mondo de Enrico Caruso ŝanĝas la kantan programon „Kial mi tion ne povus fari? Mi havas multajn geamikojn, kiuj ne ŝatas operojn, sed mi volas kanti ankaŭ por ili. Estas belege kanti por ĉiuj".

La kantisto kompreneble ne vivas nur por la muziko. Lia produktoro Tony Renis difinas la karakteron de Andreo kiel tre aventureman. Li skiadas, sportas sur surfotabulo en la maro, li fakte estas nekredeble agema. Li ankaŭ ŝatas ĉevalojn. Plej volonte li elrajdas ankoraŭ dum mateniĝo, kiam la silenton ĝenas nur sonoj de hufoj. Survoje inter la toskanaj kampetoj li povas tiel bone cerbumadi.

Li ne hezitis eĉ momenton, kiam li ricevis la proponon danci en itala versio de la populara konkurso StarDance. Eble vi miros, sed li tre bone sukcesis.

Andreo estas dufoje edziĝinta. Kun la unua edzino Enrika Cenzatti li havas du filojn Amoson kaj Matteon. La duan edzinon manaĝerinon Veronica Berti li kondukis al altaro en la jaro 2014. Ilia filino Virginie jam havis du jarojn.

La regiono, de kie li venas, estas por li la plej bela loko en la mondo. Li ŝatas revenadi en sian naskiĝlokon ĉirkaŭigitan per vitejoj kaj olivaj boskoj. „Ju pli mi vojaĝas, des pli mi volonte kuras al la kamparo, por ke mi trovu trankvilon kaj akiru novan energion" – li pripensas. Krom tio li tie havas multajn parencojn

kaj geamikojn. Li kontentas, ke ĉe la renkontoj kun ili ne estas la ununura temo nur muziko. Andreo volonte aŭskultas aliajn.

El la ŝatata Toskan-regiono li vojaĝas koncerti al la tuta mondo. Kelkfoje li estis ankaŭ en Ĉeĥio kaj venontjare alveturos denove en nian landon. La 12-an de majo 2018 li kantos en la praga Areno. Ni aŭskultos melodiojn el la preparata albumo, kiu estos eldonita nunjare aŭtune kaj ankaŭ ni aŭskultos mondajn operariojn. Akompanos lin la Ĉeĥa nacia simfonia orkestro kaj kantkoruso. Tony Renis, esp. Jarmila Rýznarová

Kanadanino gajnas la konkurson de 2017 de la plej elstara instruisto

Maggie McDonnell estis anoncita la 19-an de marto en Dubajurbo (Dubajo), kiel venkinto de la premio "Global Teacher Prize", kiu estas kvazaŭ Nobel-premio pri edukado. Ŝi loĝas kaj laboras en "Salluit", kiu estas indiĝena vilaĝo de eskimoj ĉe regiono de Kanado atingebla nur per aviada vojo.

Tiu premio de unu miliono da usonaj dolaroj staras inter tiaj plej grandaj tutmonde, kaj ĝi reliefigas la gravecon de la profesio pri edukado, krom la merito de la instruistaro esti agnoskita kaj honorigita ĉie. Maggie plenkreskis en kampara regiono de Nov-Skotio (Kanado), kaj post sia bakalaŭriĝo ŝi volontulis kvin jarojn en la Subsahara Afriko, ĉefe en agado kontraŭ AIDS-malsano. Post sia magistriĝo ŝi eklaboris kun kanadaj indiĝenoj kaj dum la lastaj ses jaroj ŝi instruis en Salluit.

Nur 1 300 homoj loĝas tie, sed malfacilaĵoj multas: socia izoleco, vintra malvarmego, media detruado, socia malegaleco, laborŝanĝanta instruistaro pro streĉiĝo, infanlerneja forigado, ado-

leska gravediĝo, seksa misuzado, konsumado de drogoj, kaj alkoholaĵoj kaj memmortigado de junuloj.

Maggie kreis programon pri allogaj agadoj al lernantoj por instigi la junulojn reveni lernejen, kaj eĉ provizore ŝi gastigas junulojn troviĝantajn en malfacilaj situacioj.

Laŭ "Global Teacher", per la premio-mono Maggie planas starigi NRO-n (Neregistara organizaĵo) celantan tiajn agojn.
El brazila interreto

La unua roboto deĵoranta kiel la policano en Dubaj-urbo

La 31-an de majo, ĉe la piedoj de la plej alta ĉielskrapturo tutmonda, la policano en Dubaj-urbo (Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj) prezentis robotan prototipon, kiu oficiale ekdeĵoris kiel policisto en la urbo. Turistoj kaj loĝantoj fotis flanke de tia stranga homido, kiu cirkuladis sur du radoj.

Vestite kiel policisto, la roboto havas en sia brusto komputilon, kiu kapablas informi la policon pri eblaj krimoj kaj elsendi datumojn pri malobeoj en trafiko. Ĝi enhavas ankaŭ kameraon por sendi aktualtempajn bildojn al la operacio-ĉambro de la polico. Krome, ĝi kapablas identigi homojn, kiuj estas serĉataj de la sekureco-fortoj.
"Ni celas, ke la robotoj konsistigu 25 procentojn da nia policistaro antaŭ la jaro 2030-a", tion asertis la brigada genera-

lo Jaled al-Razzuqi, kiu estas la estro de la polico de Dubaj-urbo. Antaŭe tiu polico jam allogis la atenton de la gazetaro, kiam ĝi enkondukis en sia floto sportajn aŭtojn, kiel Lamborghini kaj Ferrari. El Dubaj-gazeto

Esperantista renkontiĝo en Šumperk

Pafilojn, sabrojn, medalojn kaj elsendilojn kaj multajn aliajn kolektajn pecojn el la milita periodo oni povis vidi la 20-an de majo 2017 en la privata milita muzeo de sinjoro Hlavatý en Šumperk.

La ĉiĉerono diris al ni multajn detalojn pri la eksponaĵoj, por kio ili estis uzitaj kaj kiel ili atingis la muzeon.

Por ni estis interesaj uniformoj de Wehrmacht, mitraloj, emajlitaj tabuloj kun germanaj tekstoj, insignoj, tiamaj bicikloj kaj vimenplektitaj ĉaretoj, aŭtoj. La muroj estis ornamitaj per dekoj da afiŝoj kaj anoncoj, kiujn germanoj elĵetis sur la rusa teritorio, por ke la soldatoj rezignu.

Multaj bustoj kaj bildoj de Hitler, Stalin, Lenin estis kompletigitaj per bustoj de niaj prezidentoj, ne mankis pioniraj uniformoj, legitimiloj, kudromaŝinoj, libroj kaj multaj aliaj aĵoj el la post-milita periodo.

La posttagmezo estis plenigita per kantado en Esperanto, aŭskultado de sving-muziko, raportoj pri la agado de ĈEA kaj multaj ĝojis pro la premioj en tombolo.
La organizantoj el Šumperk meritas dankon pro la interesa renkontiĝo. Jana Křížková, esp. Pavol Petrik

Drabaj ĉambretoj kaj Esperanto

Nordoriente de la urbo Mnichovo Hradiště en la distrikto Mladá Boleslav en Mezbohemia regiono staras Příhrazké skály (rokoj ĉe Příhrazy-opidumo). En sep rokaj blokoj, altaj ĝis 15 metrojn, apartigitaj per fendoj kaj kunigitaj per lignaj plataĵoj, pontoj kaj ambitoj (klostra galerio), troviĝas 30 ĉambretoj (ĉeĥe světničky) kavigitaj en la rokaro.

La loko estas libere alirebla. Laŭ arkeologiaj trovaĵoj tie loĝis homoj jam en la 13-a jarcento, kiam tie staris burgo, kiu estis poste neniigita. Denove ĝi estis rekonstruita en la 15-a jarcento kaj de la jaro 1420 enloĝis ĝin husanoj, ĝis la malfeliĉa batalo ĉe Lipany en la jaro 1434. La burgo havis tri ĉarpentitajn konstruaĵojn kaj kvar-angulan grandan turon kaj palisaron.

Jen interesa komparo al Esperanto:
En la jaro **1887** la histori-scienca atento turnis sin al Drábské světničky (Drabaj ĉambretoj). En la jaro **1887** estis eldonita la Fundamento de Esperanto de L. L. Zamenhof.

La arĥeologo Josef Ladislav **Píč** (1847-1911) el la Nacia muzeo esploris la lokon. Esperantisto Karel **Píč**, ano de la Esperanta akademio, poeto, verkisto kaj filozofo (1920-1995) estis fama.

En la jaro **1921** Klubo de ĉeĥaj turistoj malfermis Drábské světničky por la publiko. En la jaro **1921** okazis en Prago la 13-a Universala Esperanta kongreso, dum kiu estis fondita plua granda E-organizo SAT – Sennacia Asocio Tutmonda.

En la jaro **1996** esperantistoj denove rekunvenadis en Ĉeĥa paradizo en pensiono Espero kaj vizitis Drábské světničky. En la sama jaro **1996** okazis en Prago 81-a Universala Esperanta kongreso, dum kiu estis proklamita Praga manifesto.

Jindřiška Drahotová

Sed: Kion signifas la vorto dráb en la ĉeĥa lingvo? Gardiston, kontroliston sur la kampoj kaj sinjoraj bienoj en la tempoj de feŭdismo. Kaj mi volus al vi rakonti legendon aŭ miton pri giganto, kiu loĝis en Drabaj ĉambretoj kaj nomiĝis Drab.

La legendo pri Drab

La sabloŝtonaj rokoj proksime de la urbo Mnichovo Hradiště (antaŭ jarcentoj) aspektis kiel mistera burgo, en kiu estis riftoj kaj kavernoj. Laŭdire tie loĝis titano Drab. Li loĝis en tiuj rokoj malproksime de homoj, por ke liaj fortaj paŝoj ne ĝenu la trankvilon de la vilaĝo, sed tiel proksime, ke li povu veni por bruto al tagmanĝo. Lia edzino mortis kaj li restis sola kaj neniu povis al li mastrumi.

Foje li iris en la vilaĝon por trovi ian knabinon por helpi al li. Sur la kampo li ekvidis belan knabinon. Li prenis ŝin al sia manplato kiel etan pasereton kaj alportis ŝin en sian groton.

Kvankam li estis bona al Anjo, tamen la knabino ofte ploris kaj foje ŝi demandis, ĉu ŝi povus viziti la gepatrojn. Drab permesis, sed ke ŝi revenu antaŭvespere. Anjo hejme cerbumis kun la gepatroj kion fari, ke ŝi povu resti ĉe la gepatroj kaj la panjo preparis cindron, kiun Anjo ŝutu sur la vojon. Sed la vento disblovis la cindron kaj Anjo devis resti ĉe Drab.

Post ia tempo denove Anjo petis, ĉu ŝi povu viziti la gepatrojn, ke ili nostalgias pri ŝi. La situacio ripetiĝis kaj la panjo donis al Anjo fadenbulon, ke ŝi debobenigu ŝpinaĵon; kiam ŝi revenos al li kaj tiel la vilaĝanoj ekvidos, kie la giganto Drab loĝas. Li demandis Anjon, ĉu la gepatroj bone fartas, sed subite li aŭdis pluajn voĉojn kaj konstatis, ke Anjo perfidis lin. La vilaĝanoj jam estis antaŭ lia trogloditejo kaj kriis al Drab.

„Ni iras liberigi Anjon. Ŝi estas homo kaj estas necese, ke ŝi vivu kun homoj“. Drab eksidis sur la egan arbostumpon kaj diris: „Mi scias, ke gigantoj devas vivi kun gigantoj kaj la homoj kun homoj. Sed mi restis sola kaj neniun mi havas. Mi ĝojis, ke Anjo helpadas al mi. Bone, Anjo, revenu al la gepatroj. Mi reciprokos Vian laboron. Rigardu en la tago de sankta Johano, sur kiun pinon falos la unuaj sunradioj, kiam la suno leviĝos. Tie estas trezoro“. Kaj fakte la homoj trovis sub la pino keston plenan de mono.

La homoj pripensis, ke Drab ne estas malbona kaj ke li volas helpi al la homoj kaj ankaŭ la vilaĝanoj klopodis vizitadi lin kaj reciproke helpi. El granda amikeco iĝis ankaŭ la nomo de tiuj rokoj, al kiuj ĉiuj diras Drabaj ĉambretoj - ĉeĥe Drábské světničky.

La legendon el Ĉeĥa paradizo esperantigis Jarmila Rýznarová

El la redakcio:

1) Ne forgesu aliĝi al la aŭtuna lingva seminario denove en Skokovy en la tagoj de la 7-a ĝis la 10-a de septembro 2017. Aliĝu rekte ĉe Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav, telefono 720 652 320

mail: drahotovaesperanto@seznam.cz

2) Ĉu vi rimarkis, karaj legantoj, ke la lastaj Informiloj estas skribitaj per pli grandaj literoj? Kion fari, neniu el ni juniĝas kaj al multaj el ni ŝajnas literoj pli kaj pli malgrandaj (ankaŭ al Via redaktorino). Ja, duono el niaj membroj estas pli aĝaj ol 65, tridek el ili estas aĝaj inter 80 kaj 97 jarojn. Ili meritas grandan aplaŭdon, kiam ili ankoraŭ povas legi kaj interesiĝas pri nia amata Esperanto. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 300,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 20 €. IBAN: CZ8108000000001926460283 BIC: GIBACZPX
Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.